

MALGRANDA REVUO

Nro 4 • 1952

10a JARO

PREZO: 1.50 K.

ENHAVO:

	Paĝo
Pri la ĉesigo de MR, de S. Engholm	97
Skizo pri laboro de Studenta Esperanto-Klubo eb Kopenhago, de Johs. Vesterland-Andersen	99
Silenta Fredriko, de S. Engholm	103
Unu el ni, de William Auld	115
Kolomano Kalocsay ĉe la limo, de J. Régulo Pérez	115
Debato	117
Parolo al aliopiniulo, de K. Wilgenhof	120
Literaturo	121

Redaktoro — Eldonanto:

STELLAN ENGHOLM, HAGGE, SVEDUJO

MALGRANDA REVUO

aperas provizore kvaronjare. Prezo 1,50 kr. (inkl. sendkoston).
Jarabono 6 kr. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 5 rpk. —
S. Engholm, Box 205, Hagge, Svedujo. Poŝta ĝirokonto 268023.

MR ne aperigas anoncojn aŭ informojn.

Nemenditaj manuskriptoj estas resendataj nur se akompanas
ilin afranko por resendo.

Perantoj

Belgujo: Belga Esperanto-Instituto, Oostenstr. 26, Antwerpen.
Flandra Esperanto-Instituto, Blankenberge Steenweg 72,
Brugge.

Brasiliĝo: Brazila Esperanto-Ligo, Praça da Republica 54—1,
Rio de Janeiro.

Britujo: Libroservo de UEA, Heronsgate, Rickmansworth
(Herts).

Danujo: Libroservo de CDEL, Hörmarksalle 5, Risskov.
Esperanto-Foreningen for Danske Akademikere, Lakse-
gade 35, Kopenhago K.

Finnlando: Eldono Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki KÄ.

Francujo: Unuiĝo Esperantista de Francujo, 34 rue de Chabrol,
Paris X.

Germanujo: Dr. Siegfried Ziegler Verlag, Engelbertstrasse 7,
(13 b) München-Pasing.

Hispanujo: Sro Amado Pons, Sicilia 217, 1—2, Barcelona.

Israel: Sro J. Kohen-Cedek, P. O. B. 7015, Jerusalem.

Italujo: Sro Leo Costantini, Piazza Lagosta 2, Milano.

Jugoslavio: Sro Kralj Drago, Rozna dolina 6—22, Ljubljana.

Nederlando: Sro L. C. Deij, Putsebocht 181, Rotterdam Z.

Norvegujo: Esperantoforlaget A/S, Boks 492, Oslo.

Polujo: R. Sakowicz, Parafialna 3, Nowa Sol.

Portugalujo: Sro A. P. da Silva, Rua 48 nro 7—3 Alvalade,
Lisboa.

Svisujo: Sro O. Walder, Eigenheim, Romanshorn.

Usono: Sro Arthur S. Kane, 725 B East Chevy Chase, Glen-
dale 5, California.

MALGRANDA REVUO

Nro 4

10a JARO

1952

Per tiu ĉi numero mi ĉesigas la eldonadon de Malgranda
Revuo.

Mi provis per MR krei kulturalan revuon en esperanto. La
provo ampleksis dek jarojn de neofta sed konstanta kaj regula
aperigo, kaj la faritaj spertoj permesas certajn konkludojn.

1. Estas tre malfacile havigi necesan kvanton da originalaj
artikoloj diverstemaj kaj kontentige altkvalitaj — eĉ por tiel
malgranda kaj neofte aperanta periodaĵo kiel MR. Pro manko
de originala materialo mi multfoje tradukis kaj aperigis ar-
tikolojn de eminentaj nacilingvaj humanistoj kaj sciencistoj.
Sendube tiuj artikoloj donis al MR ĝian plej altkvalitan en-
havon — ankaŭ tio prinpensinda detalo. Tia ĉerpado el naci-
lingva kultura vivo estas bona kaj utila. Tamen oni ne povas
tiamaniere vivteni esperantan kulturalan revuon. Por malgranda
kvaronjara revuo oni kun grandaj klopodoj eble povas daŭre
trovi aperigindan materialon. Por pli granda kaj monata revuo
tio certe ne estus ebla en la nunaj cirkonstancoj.

2. Troviĝas tro malmulte da homoj, kiuj havas intereson
por tia revuo. La abonnumero de MR ĝenerale estis iom pli
ol 400. Por povi eldoni revuon kun tia eldonkvanto la eldonanto
devas mem pagi sufiĉe grandan parton de la kostoj aŭ iel
havigi monon por tiu celo. Revuo kun pli populara kaj distra
enhavo povas atingi multe pli altan nombron, sed mia celo
ne estis krei tian revuon.

3. La eldonado dum tiaj cirkonstancoj postulas laboron,
kiu estas tre granda en komparo kun la rezulto. Redakti
esperantan revuon signifas ne nur akcepti manuskriptojn kaj
sendi ilin al kompostejo. Ekspedi ĝin ne signifas, ke la presejo

transdonas la presitan numeron al ekspedejo kaj ke ĉio jen estas preta. Mi certe ne troigas, se mi diras, ke ĉiu numero de MR postulis — inkluzive mian verkadon kaj necesan korespondon kun kontribuantoj, perantoj kaj rektaj abonantoj — ĉ. 75 horojn. Nur dum certa tempo oni kapablas fari tiom da laboro flanke de profesia laboro kaj aliaj nepre plenumindaj taskoj.

*

El ĉio tio mi tiras la konkludon, ke ankoraŭ ne estas eble daŭre eldoni seriozan kulturan revuon en esperanto. Granda organizo aŭ relative granda eldonejo certe havas pli grandan eblecon ol privata eldonanto akiri abonantojn. La nombro tamen certe ne sufiĉas por kovri la elspezojn, kaj en organizo aŭ eldonejo la enspezoj devas kovri la elspezojn, ĉar alie la entrepreno bankrotas.

Eble oni povus per garantiantoj kaj alia monkolektado havigi necesan kapitalon por modesta revuo, same kiel oni ofte devas fari por vivteni la plej bonajn nacilingvajjn kulturajn revuojn. Persone mi tamen ne ŝatas tian solvon.

*

Sed ĉu serioza kultura revuo entute estas bezonata en esperanto? La pli granda parto de la esperantistoj verŝajne diras, ke ne. Oni povas ja agrable kaj tute kontentige vivi sian esperantistan vivon sen tiaj zorgoj kaj klopodoj.

La fidela amika rondo ĉirkaŭ Malgranda Revuo, legantoj kaj verkantoj same, verŝajne diras, ke jes. Amikoj! Mi dankas vin pro ĉio, kion vi alportis al nia komuna afero, kaj pro la ĝojo, kiun vi donis al mi.

Kion ni nun faru? Ni daŭrigu nian laboron, por ke venu la tago, kiam ni estos pli multaj kaj havos pli da spirita forto. Ni ne forgesu la malnovan devizon: "Por ke lingvo estu universala, ne sufiĉas nomi ĝin tia." Kaj ni aldonu: "Por ke lingvo estu kultura lingvo, ne sufiĉas nomi ĝin tia."

S. Engholm.

Skizo pri laboro de Studenta Esperanto-Klubo en Kopenhago.

De Johs. Vesterland-Andersen

Antaŭ tri kaj duona jaroj fondiĝis en Kopenhago "Studenta Esperanto-Klubo" — SEK.

Ni estis kelkaj studentoj kaj studintoj, kiuj kelkfoje priparolis, ĉu estas eble interesigi universitatanojn pri esperanto. Ni konkludis, ke fakte ekzistas nur unu solvo, nome fondiĝo de societo, kie studentoj kaj studintoj havu la okazon kulturi la lingvon. Kaj SEK fondiĝis. Jam de la komenco estis evidente, ke se ni deziras sukceson en nia laboro, ni devas labori sammaniere kiel aliaj kulturaj studentaj organizaĵoj ĉi tie. Tio signifas, ke ni ĉiam bezonas altnivelajn kulturajn programojn por kontentigi niajn anojn: ili ne kontentiĝas per simpla laŭtleĝado, "kiu scias kion"-konkursoj aŭ simile. Krome oni atendas, ke societo, kiu pledas internacian lingvon, ankaŭ mem laboras internacie. Jen niaj kondiĉoj! Kaj krome oni ne forgesu, ke nia misio estas ne nur por tiuj, kiuj jam lernis la lingvon — sed ankaŭ por tiuj, kiuj lernos ĝin.

Sed unue, kiel labori internacie? Jam kelkajn monatojn post la fondo de SEK ni invitis grupon de 10 studentoj el Francujo kaj Norvegujo al Danlando por 2-semajna studrestado. Niaj gastoj vizitis ne nur Kopenhagon sed ankaŭ la provincon. Kaj ĉie, kien ili venis, ili vizitis kulturajn instituciojn, fabrikojn, kooperajn entreprenojn k. s. En Kopenhago ni aranĝis kelkajn prelegojn en la Universitato pri temoj interesaj por eksterlandanoj, ekz. pri dana agrikulturo, pri ekonomio de Danlando k. s. Vespere estis ofte diversaj aranĝoj en la klubo, kaj evidente jam regis internacia atmosfero. Estas aldoninde, ke niaj gastoj loĝis ĉe kolegoj, kaj tiamaniere ili eksentis la ritmon de nia vivo ĉiutage. Tiu unua studvojaĝo sukcesis plene, kaj poste ni aranĝis unu similan ĉiujare. Kelkfoje niaj anoj havas la ĝojon akcepti invitojn el eksterlando por similaj aranĝoj, ekz. niaj francaj gastoj poste invitis grupon de danaj studentoj al Parizo, kaj ĉi-jare kelkaj anoj vizitis Sudger-

manujon — ankaŭ laŭ invito de partoprenintoj de studvojaĝo.

"Dana Internacia Studentkomitato" — DIS — estas oficiala dana organizaĵo, kies celo estas helpi al danaj studentoj vojaĝantaj eksterlande kaj al eksterlandaj studentoj vizitantaj Danlandon. Al DIS ni proponis kunlaboron, kaj tion oni tuj akceptis. La ĝisnuna rezultato de tiu kunlaboro estas 3 internaciaj arkeologiaj tendaroj por esperantistaj studentoj. La celo de tiuj tendaroj estas, ke eksterlandaj studentoj kune kun danaj kolegoj elfosu interesajn arkeologiajn terenojn kaj samtempe gajnu monon por malmultekosta restado ĉi tie. Ĝis kiam ni ekkunlaboris kun DIS, nur angla lingvo estis oficiala en tiuj tendaroj — sed poste esperanto oficialiĝis dum unu periodo ĉiusomere. La tendaroj okazintaj en 1950 (ĉe vikinga fortikaĵo Aggersborg en Jutlando) kaj en 1951 (apud urbo Svaneke sur insulo Bornholm) estis ĉiel tre sukcesaj. Sed por la ĉijara tendaro nur tri eksterlandanoj aliĝis — kaj el ili nur unu venis . . . Domaĝe, ke tia bona aranĝo ne daŭre povas okazi pro manko de partoprenantoj. Tamen ni iel volas aranĝi tendaron dum la venonta somero — la lastan, se tro malmultaj aliĝos. Ĝis nun la dana ŝtato (en la buĝeto de DIS) donis pli ol 16.000 d. kr. kiel subvenciojn por la tendaroj por esperantistaj studentoj.

Generale la anoj de SEK kunvenas dufoje monate, kaj ĝis nun ni ofte sukcesis fari bonegajn kunvenojn. Inter la prelegintoj en SEK ni citu kelkajn nomojn kaj temojn: Magistro Vilho Setälä pri filologio, d-ro M. Manders, kiun ni invitis al Danlando, faris du streĉe interesajn prelegojn esperantologiajn, G. F. Makkink pri la signifo de akvomanko en Nederlando, universitata profesoro F. Egami pri vivcirkonstancoj de studentoj kaj profesoroj en Japanujo, Marinko Gjivoje pri jugoslavaj grotoj, docento S. Pragano pri originala esperanto-literaturo, kaj aliaj nomoj kaj temoj estas citindaj. Multaj eksterlandaj studentoj vizitante Danlandon diversmaniere faris kontribuojn al niaj programoj. Ankoraŭ ni menciuj tri aranĝojn. Pasintan aŭtunon ni montris la jugoslavan filmon "Ni obeigos la akvojn" al niaj anoj. Vere bonkvalita filmo, kiu en nia klubo montriĝis por la unua fojo ekster Jugoslavujo. Kaj pasintjare okaze de kristnasko ni aranĝis koncerton. Ĉirkaŭ 30 studentoj

pri kantado kaj muziko kantis aŭ muzikis. La programo estis altkvalita, kaj la vicrektoro de kopenhaga Universitato faris paroladon dankante al SEK pro ĝia internacia laboro. Somere 1952 Studenta Konsilantaro de kopenhaga Universitato aranĝis grandskalan feston dum du tagoj, ĉar oni deziris gajni monon por stipendioj, kiuj estas disdonataj tiel, ke la ricevantoj de ili povas senpage vespermanĝi dum 1/2 jaro. Kelkaj studentaj organizaĵoj ricevis specialajn taskojn okaze de tiu festo. SEK promesis establi grandan startrinkejon, kiu fariĝis agrabla ero en la ampleksa programo de la festo, kaj krome SEK ricevis — por sia ĉiam malplena kaso — parton de la profito.

Por ke SEK estu ne nur kopenhaga afero, fondiĝis Esperanto-Federacio de Danaj Altlernejoj, kiuj jam havas anojn en diversaj partoj de la lando. EFDA estas reprezentata en la Komunkomitato de Danaj Esperanto-Organizoj, kaj per sia libro-servo ĝi gajnas iom da mono por la tuta laboro. Dum la lastaj du jaroj la libro-servo de EFDA funkciigis specialan servon por la publikaj bibliotekoj kun tiu rezultato, ke preskaŭ ĉiuj gravaj bibliotekoj en Danlando nun regule aĉetas esperantoliteraturon. Ĉu tiu intereso estos daŭra, dependas nur de la prunteprenantoj. Antaŭ unu jaro SEK kaj EFDA luis sian propran etan kontoron en la centro de Kopenhago, kaj tio estis tre grava progreso. Tie nun troviĝas nia biblioteko (kiu jam enhavas ĉ. 500 diversajn erojn), libroservo, arkivaĵoj ktp.

Ĉiujn studsezonojn post la fondo de SEK okazis komencantaj kursoj por studentoj en Kopenhago. Ili ĉiam okazas en La Universitato, kaj espereble ni post ne tro multaj jaroj havos katedron de esperanto ĉi tie. Dum la du lastaj vintroj ni aranĝis kurson ankaŭ por progresintoj. En 1951 ni por la unua fojo aranĝis studrondon, ne pri sed en esperanto. La temo estis "La kondiĉoj por interpopola kunlaborado", kaj kiel komunan libron ni trastudis libron de Edmond Privat: Interpopola konduto. La rondo bone laboris, kaj pro tio ni nun ĵus komencis novan studrondon. Ĉi-jare ni pritraktos la originalan esperanto-literaturon, kaj kiel komunan libron ni uzas "De paĝo al paĝo" de Ludoviko Totsche, kvankam tiu libro neniel povas kontentigi niajn dezirojn; sed bedaŭrinde mankas al ni sistema verko pri esperanto-literaturo. Ĝi aperu! Kursojn kaj

studrondojn ĉijare partoprenas 35 studentoj aŭ studintoj, 10 estas komencantoj. Ni esperas, ke la nombro de tiuj lastaj kreskos; sed tiu kreskado estas dependa de grava kaj tempo-raba informa laboro. Dum la tempo post la fondo de SEK ne nur la nombro — hodiaŭ ni havas pli ol 50 anojn — sed ankaŭ la aktiveco de la anoj multe kreskis. Malfacilaĵojn ni havis kaj havos. Eĉ multaj esperantistoj ne komprenas la signifon de nia laboro. Ili tute ne povas aŭ volas kompreni, ke se nia laboro daŭre sukcesu, ni laboru ne laŭ la skemoj aŭ tradicioj de ordinaraĵoj esperanto-klubo, sed simile al aliaj societoj por studentoj. Same ili ne povas kompreni, ke estas necese, ke nur studentoj kaj altlernejoj (studintoj) ĝenerale povas partopreni niajn aranĝojn. Sed espereble tiuj malglataĵoj iom post iom malaperos. Nia laboro estas en pli alta grado per esperanto ol por esperanto. Ĉiajn sektajn inklinojn ni klopodas eviti: ni ne kantas la himnon, ne parolas pri interna ideo, ne kultas "la majstron", ne multe uzas la vorton samideano. Eble tiuj aferoj povas esti ĝustaj kaj utilaj. Sed ne en nia laboro.

Kiam ni komencis nian laboron mankis al ni kontakto inter diverslandaj esperantistaj studentoj, kaj por iom ŝanĝi tiun staton ni ekeldonis internacian studentan gazeton "La Studento", kaj iom post iom ni trovis sufiĉe multajn abonantojn, tiel ke ĝi estonte povas aperi pli regule.

Jam dum kelka tempo ni estas priparolintaj okazigon de internacia konferenco por studentoj kaj altlernejoj. Pasintan someron tiu plano efektiviĝis en Schluchsee en Sudgermanujo. La temoj de la konferenco i. a. pritraktis diversajn sociajn problemojn de la studentaro, kaj krome fondiĝis "Internacia Federacio de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejoj" IFESA, kiu ekfunkcios de 1. de jan. 1953.

Nun la organiza aparato estas en ordo — nun mankas nur iniciatemaj laborantoj en preskaŭ ĉiuj universitataj urboj . . .

Kopenhago, Danlando, oktobro 1952.

Johs. Vesterland-Andersen

Silenta Fredriko.

De Stellan Engholm

Tiu tago komenciĝis kiel liaj aliaj labortagoj.

Duonhoron post la kvina li levis sin el la lito kaj malrapide surmetis vestojn kaj ŝuojn, duonkonscie, kun korpo kaj menso ankoraŭ paralizitaj de laco kaj dormemo. Li sidigis sin ĉe la tablo, kaj la fratino verŝis kafon en lian tason. En duondormo li trinkis kaj manĝis kelkajn panpecojn. Poste li iris eksteren. La freŝa aero iom vigligis lin, kaj kiam li revenis, li informis al la patrino, kian veteron oni povas atendi. Tion ŝi ĉiumatene volis ekscii.

Li trinkis ankoraŭ tason da kafo kaj restis sidanta, ĝis estis tempo por foriri. Kvin minutojn post la sesa li levis sin, faris kapklinon al la kuŝanta patrino kaj al la fratino kaj surmetis la dorsosakon, en kiun la fratino estis metinta manĝaĵon, lakton kaj kafon por lia tuttaga foresto.

— Estas tempo por iri. Do, ĝis la vespero!

Tiel komenciĝis ĉiu lia labortago, de jaroj kaj jaroj. Sian ĉiutagan laboron li komencis la tagon post tiu, kiam li finis la popolan lernejon kaj ankoraŭ ne havis dektri jarojn. Tiam la patrino laboris por vivteni sin kaj la du infanojn — la patro mortis kelkajn jarojn antaŭe. La fratino, du jarojn pli aĝa, jam tiam estis kurbdorsa kaj forte lamis, pro iama akcidento.

Li same kiel la patrino faris kampajn laborojn en la grandbieno. Post kelkaj jaroj difektiĝis la sano de la patrino, kaj kiam li estis dudekjara, ŝi ne plu povis labori. Reŭmatismo kaj aliaj malsanoj turmentis ŝin, kaj longajn periodojn ŝi devis resti en la lito. La fratino prizorgis la hejmon.

Foje li fantaziis pri laboro en aliaj lokoj, en industrio. Sed la fantazioj restis revoj. Kiel aranĝi por la patrino kaj la fratino? Kaj transdoni ilin al komunuma prizorgo? Ne!

Lia laboro preskaŭ ĉiam ŝajnis al li teda kaj monotona. Iom da rekompenco li trovis vespere en libroj. Multajn li aĉetis mem — en tiu tempo troviĝis multe da libroj tre malkaraj — kaj aliajn li pruntis en la komunuma biblioteko.

Li neniam plendis pri io, kaj kvankam li ofte ŝajnis mal-

gaja, li ĉiam estis afabla al ĉiuj. Ordinare li malmulte parolis, kaj la laborkamaradoj nomis lin Silenta Fredriko.

Jaroj kaj jaroj pasis, kaj nun li estis preskaŭ tridekjara.

*

Ilia dometo kuŝis sola en la arbaro, kaj elirinte tra la barilpordo li troviĝis sur malgranda vojo, kiun iris preskaŭ neniun homo krom li kaj lia fratino. Tiu kilometrolonga vojo dum liaj ĉiutagaj matenaj iroj fariĝis kvazaŭ lia propra, kaj ĝi ŝajnis al li la plej bona parto de lia mondo. Ĉe unu ekstremo, malantaŭ li, kuŝis la hejmo kun ĝiaj devoj kaj pensoj kaj speciala atmosfero — ĉe la alia ekstremo agroj kaj domoj, labortagaj devoj kaj ordonoj kaj rilatoj kun diversaj homoj. Sed inter tiuj ekstremoj li mem disponis pri si. Se la vetero ne estis malbona, li ĉiam foriris tiel frue, ke li povis iri malrapide kaj foje halti. Li konis ĉiun pinon kaj piceon laŭ la vojeto, ĉiun betulon kaj alnon, ĉiun ŝtonon kaj herbotufon kaj la florojn, kiuj de jaro al jaro aperis en la samaj lokoj.

Tiel li iris ankaŭ en tiu ĉi mateno. Estis en la komenco de aŭgusto, kaj la vetero estis bela kaj someraspekta.

La tri lastajn semajnojn li estis okupita pri drenfosado laŭ diversaj vojoj de la grandbieno, rebonigis malnovajn kaj faris novajn. Dum la tuta tempo estis klara ĉielo kaj forta varmo. Fredriko ŝatis varmon kaj sunlumon kaj ŝatis la naturon, sed kiam li estis forlasinta sian propran vojon kaj atingis sian laborlokon, la mondo kaj la vivo kvazaŭ ŝanĝis aspekton. Dek horojn li devis labori kaj la taga salajro estis fiksita kaj tre malgranda. Estus pli bone, se li ricevus pagon laŭ farita laboro. Tiuokaze li povus labori laŭplaĉe, ankaŭ tre energie. Sed tion la administranto ne konsentis al li. Estus pli bone, se li almenaŭ rajtus labori forte kaj poste iom ripozi en la ombro de la betuloj, fari promenon tra la arbaro aŭ iri por bani sin en la lago. Sed tion li ne rajtis. Li devis nur fosi kaj fosi dek horojn en malfacile prilaborebla grundo, plena de malmola gruzo, ŝtonoj kaj arboradikoj, ne rapide, ankaŭ ne tro malrapide.

Nun li estis denove survoje al tiu sama laboro. Jam li for-

lasis sian propran vojon kaj iris sur la granda ĉe la rando de la valo, kaj inter la arboj li distingis domojn kaj agrojn kaj sur altaĵo en la mezo la kastelsimilan domon de la grandbieno. Svarmoj da hirundoj senĉese zigzagis en la alto.

Jen li komencis iri malrapide, baldaŭ haltis kaj restis staranta kvazaŭ en stato de nekompreneo kaj klopodo por ekkompreni. Kaptis lin iu stranga sento kvazaŭ dum malrapida vekiĝo el realoimpresa sonĝo. Lia ĵusa imago pri la laboro de tiu ĉi tago subite komencis ŝajni al li nereala. Li provis reteni la imagon, sed iel ĝi forglitis kiel nura sonĝo, kaj anstataŭ ĝi aperis alia imago, kaj jen ĝi sola ŝajnis reala kaj atentinda.

Li rektigis sin, rigardis la pejzaĝon kaj la hirundojn sub la ĉielo, spiris profunde kaj ridetis kvazaŭ pro feliĉa eltrovo. Li faris decidan kapklinton, turnis sin kaj komencis iri en direkto kontraŭa, al la sudo. Malantaŭ li estis la grandbieno kaj la preĝejo vilaĝo, dekstre la valebeno kun agroj kaj malgranda rivero. Unu kilometron pli sude finiĝis la agroj. Tie estis arbaro, kaj inter la arboj brilis lago en la matena lumo.

Li revenis al sia propra vojo, hezitis momente kaj poste daŭrigis laŭ la granda vojo. Post tricent metroj li venis al herbejo kun fojnejo. La fojnejo staris inter disaj betuloj sur seka grundo, kaj la roso sur la tero jam malaperis pro la suno. La loko plaĉis al li. Li forlasis la vojon kaj sidigis sin apud la fojnejo, en duonkuŝa komforta pozicio.

Malmultajn minutojn li estis sidinta tie, kiam malfermiĝis la pordo de la fojnejo kaj fojnokovrita figuro kun rigidaj movoj elrampis el kavo en la fojno de la plenŝtopita dometo. Li fermis la pordon, deprenis la jakon kaj forskuis fojnon de ĝi kaj de la pantalono kaj forpinĉis herbojn, kiuj eniris sub la ĉemizkolomon. Li ekvidis Fredrikon. Dum momento li silente kaj demande rigardis lin, poste faris kelkajn paŝojn al li, faris ĝentilan klinon kaj diris:

— Bonan matenon, sinjoro!

— Bonan matenon, respondis Fredriko, afable sed ne entuziasme.

Fredriko konis la vagulon. Jam en lia infanaĝo la migranto unu- aŭ dufoje en la jaro trapasis la regionon, kaj ankoraŭ

li same vagis. En la antaŭa posttagmezo li preteriris la lokon, kie Fredriko laboris, kaj li haltis kaj iom babilis kun li. Kiel ĉiuj profesiaj vaguloj li havis ampleksajn sciojn pri lokoj kaj homoj laŭ la vojoj, kiujn li iris, kaj li ankaŭ sciis bone, kiu kaj kia estas Silenta Fredriko.

— Jen mia hotelo. Ĝi ne estas impona, tamen bona. Tiel bona lito ne troviĝas eĉ en iu Granda Hotelo, estu certa. Ĉu vi laboros tie ĉi hodiaŭ?

— Ne, hodiaŭ mi ne laboros, respondis Fredriko.

— Vi ne laboros hodiaŭ? diris la vagulo demande. Fredriko tamen portis la samajn laborvestojn kiel hieraŭ, kaj lia dorsosako kun manĝaĵo kuŝis sur la herbo apud li. — Kion vi do faros?

— Nenion mi faros.

— Nu jes, sed vi tamen okupos vin pri io? Pasigos la tempon en iu aŭ alia maniero?

— Mi ĵus decidis, ke mi estu libera hodiaŭ. Nun mi sidas tie ĉi. Kiam mi ne plu emos resti mi foriros kaj faros tion, kio plaĉos al mi, iros bani min aŭ iros en la arbaron aŭ faros ion alian, pri kio decidis neniun krom mi mem. Vidu, dum deksep jaroj mi vidis tiom da belaj tagoj, kaj mi volis ĝui ilin kaj ĝoji pro ili, sed ĉiam mi estis katenita al fosilo aŭ hakilo aŭ al ĉevalo kaj ŝarĝoĉaro aŭ al io alia kaj devis kiel sklavo resti tie. Vidu, baldaŭ venos la aŭtuno kaj la belaj tagoj estos for. Kaj vidu tie supre, kiel flugas la hirundoj! Bela kaj libera estas la mondo. Ĉu ne ankaŭ mi rajtas esti libera almenaŭ unu tagon? Tial mi ĵus turnis min kaj ne iris al mia laborloko.

La vagulo pli atente rigardis Fredrikon, kun iom da surprizo, scivolo kaj preskaŭ suspekto.

— Ho tiel, tiel, diris la vagulo. Sed libera vi ja estas ĉiun sepan tagon?

— Dimanĉe? Ha, tiam oni bezonas ripozi post la tuta semajno. Kaj eĉ se oni estas libera, tio estas nur kvazaŭ laŭ ordono. Sed nun mi volas mem decidi pri tempo kaj faro. Cetere, vi, kiu tiom ŝatas liberecon, certe komprenas, kion mi volas diri.

La vagulo rigardis Fredrikon ankoraŭ pli atente kaj enpensiĝis.

— Ŝatas liberecon . . . li ripetis post ioma silento. Ĉu vi kredas, ke ni vaguloj estas liberaj homoj?

— Ĉu vi ne iras kien kaj kiam vi mem volas, ĉu iu ordonas al vi, kion vi devas fari kaj kiam?

— Vi ne konas nian profesion, amiko. Ankaŭ ni devas vivteni nin, kvankam ni vivas modeste. Ni marŝas dudek kilometrojn ĉiutage, foje pli, foje malpli. Por ne morti de malsato ni devas ofte konduki humilaĉe aŭ eltrovi stultajn rakontojn kaj antaŭ ĉio elserĉi la ĝustajn lokojn kaj la ĝustajn homojn. Kaj vestoj kaj ŝuoj, eĉ se ĉifonaj, ne venas per si mem al ni. La rilato inter klopodo kaj rekompenco estas pli avantaĝa por vi ol por mi. Kaj ĉu mi ne dependas de homoj? Ho, multe pli ol vi! Eble ni revas same multe pri libereco kiel vi. Provu imagi, kiom ofte mi sentis deziron eniri en butikon por aĉeti ion, kion mi deziras kaj plej ofte tre bezonas, kiom ofte mi deziris, ke tia aŭ tia hejmo estu mia kaj mi tie povu aranĝi kaj vivi laŭ propra plaĉo. Certe mi povus fari same longan liston kiel vi pri manko de libereco. — Sed, amiko, ĉu vi eventuale povus regali min per taseto da kafo? Mi ne farus tian demandon, se vi estus en via laboro, sed ĉar vi estas libera, vi certe povos sufiĉe facile havigi pli, se la provizo ne sufiĉos.

Fredriko malfermis la dorsosakon, enverŝis tason da kafo kaj ankaŭ donis al li kelkajn buterpanojn.

— Sed kial vi do vagas? li daŭrigis post ioma silento.

— Sed kial vi do laboras? demandis la vagulo kun rideto.

— Mi volas vivteni min per mia propra forto. Sed krome mi havas patrinon kaj fratinnon.

— Mi scias. Kaj tio lasta estas por vi ŝarĝo?

— Ne diru ŝarĝo!

— Kiel vi volas. Sen ili vi tamen pli facile aranĝus por vi laŭ via propra plaĉo.

— Nu, verŝajne.

La vagulo fariĝis pli serioza, ŝajne intencis paroli sed hezitis, fine tamen diris:

— Tio estas por vi ŝarĝo, egale se vi volas uzi la vorton

aŭ ne. Sed jen vidu. En iu loko vivas ankoraŭ maljuna kaj malriĉa virino, kies filo dum tridek jaroj nenion faris por mildigi ŝian sorton. Ankaŭ tio estas ŝarĝo . . .

Lia voĉo formortis. Fredriko rigardis lin kvazaŭ li volus retiri sin de sia kunulo.

— Ĉu tiu filo estas la sola filo? li tamen demandis.

— Ne la sola, tamen filo.

Kiam la vagulo post iom da tempo levis la rigardon, la vizaĝo de Fredriko frape sangigis. Ĝi havis strange streĉitan esprimon, jen kaj jen rompitan de spasmaj moviĝoj, kaj la okuloj aspektis kiel akvosurfaco sub subitaj kaj diversdirektaj ventoj.

Fredriko salte levis sin, ĵetis la dorsosakon sur la ŝultrojn kaj skuus la manojn.

— Estas labirinto, estas labirinto sen eliro! li elpremis per sibla voĉo, duone al si mem, duone al la vagulo, kaj li turnis sin por foriri.

— Momenton, amiko! vokis la vagulo. Ĉu vi aŭdis pri socialismo?

Fredriko returnis sin kaj lia ekscitita esprimo parte cedis lokon al miro.

— Preskaŭ ne. Ĉe ni en la kamparo ne estas socialistoj. Sed mi legis pri ĝi, eĉ multe. — Ĉu vi volas diri, ke la socialismo povos fari nin sendependaj?

— Nu, ne sendependaj sed . . .

Fredriko denove turnis sin kaj foriris.

— Ankoraŭ unu vorton! kriis la vagulo. Kion vi efektive intencas fari hodiaŭ?

— Nur esti libera, kriis Fredriko responde kaj rapide foriris.

*

Li sidis ĉe la bordo de la lago, kun la dorso kontraŭ dika, oblikva pinotrunko, ĉe la fundo de malgranda golfo. Antaŭ li la malgrandaj krispoj de la akvosurfaco glitis antaŭen ĝis liaj piedoj, kaj sub la surfaco strioj kaj makuloj de flava lumo vibre moviĝis sur ŝtonoj kaj sablo.

Lia ekscito jam estis for, kaj el lia konscio forviŝiĝis ĉiuj

pensoj pri laboro kaj ĉiutaga vivo kaj eĉ pri la ĵusa renkontiĝo. Senmova li sidis tie, medite rigardante la naturon, kvazaŭ atendente.

Ŝajnis al li, ke li sidis tie jam longe, kaj li surpriziĝis, kiam li rigardis sian horloĝon kaj trovis, ke estas nur la oka, la tempo por lia matenmanĝa paŭzo. Sed li ne emis manĝi nun, kaj li ankaŭ ne emis resti sidanta pli longe. Li volis ĝui de sia libereco, sed ne estis klare al li, kion li faru.

Li levis sin, faris kelkajn malrapidajn paŝojn laŭ la bordo, klinis sin, prenis kaj rigardis iun ŝtoneton, kiu kaptis lian atenton, lasis ĝin fali, faris ankoraŭ kelkajn paŝojn kaj rigardis aliajn aferojn, ŝtonblokojn, arbojn kaj arbustojn.

Irante tiel li baldaŭ elvenis el la golfo kaj havis liberan vidon laŭ sufiĉe longa parto de la bordo. En kelka distanco li ekvidis du knabojn, dekjarajn aŭ iom pli, kiuj kun klinitaj dorsoj vadis en la neprofunda akvo ĉe la bordo, streĉe rigardante en la akvon kaj jen kaj jen metante la manojn en ĝin, kvazaŭ ili volus kapti ion. Iom pli malproksime kuŝis boato.

Li tuj komprenis, kion ili faras. Ili rigardas en la akvon kaj turnas la ŝtonojn serĉante tiujn senutilajn fiŝetojn, kiujn oni nomas perĉoj, aŭ lojtojn aŭ kankrojn, ankaŭ la du lastaj tamen senutilaj, ĉar ĉe la bordo troviĝas nur tre malgrandaj lojtoj, kaj la kankroj ankoraŭ estas molŝelaj, kaj kapti ne estas permesita. Kiam li estis malgranda li multfoje iris tiel kun aliaj infanoj, eĉ ĝuste tie ĉi, ĉar tiu ĉi parto de la lago estis plej proksima al lia hejmo. Estis streĉe interesa serĉado kaj granda plezuro.

Li iris pli proksimen al la knaboj. Baldaŭ ili rimarkis lin, rektigis sin kaj staris singarde pretaj por forkuri se necese. Sed trankvile iranta viro en ĉiutagaj laborvestoj ne timigis ilin.

— Ĉu vi ion trovas? diris Fredriko sen iu ajn saluto aŭ enkonduko.

— Ni trovis tri perĉojn, sed nur unu ni sukcesis kapti.

— Kaj kion vi faris per ĝi?

— Ni lasis ĝin fornaĝi, ĉar por kio ni uzu ĝin? Ni remis kun trenhoko, kaj ni fiŝis per vergoj, kun foksenoj kiel logaĵo, sed nenion ni ricevis, kaj jen ni albordeĝis por rigardi, ĉu troviĝas io sub la ŝtonoj.

— Vi estas liberaj, ne devas ion fari nun?

— Ankoraŭ restas unu monato ĝis la lernejo. Foje ni devas iom labori sed ne tro. Ĉu vi laboras en la arbaro tie ĉi?

— Ne. Ankaŭ mi estas libera hodiaŭ kaj nenion faras.

— Aha. Sed kion vi faras tie ĉi? Fiŝas?

— Ne. Mi nur iris tien ĉi por vidi, kiel aspektas ĉe la lago.

Ili ne montris pli da intereso por Fredriko. Post momenta interkonsiliĝo ili decidis iri al alia loko, elpuŝis la boaton kaj remis for.

Fredriko restis staranta sur la bordo kaj sekvis ilin per la rigardo, ĝis ili post kelka tempo malaperis malantaŭ terlango, kaj li staris tie longe post ilia malapero. Fine li tamen turnis sin, malrapide reiris laŭ la bordo, prenis sian dorsosakon ĉe la radikoj de la oblikva pino kaj reiris al la granda vojo, kiu estis ne malproksima. Kiam li denove staris sur ĝi, li povis vidi tiun parton de la vojo, kie troviĝis la fojnejo. Eble la vagulo ankoraŭ ripozis tie.

Ankaŭ tie li restis staranta dum iom da tempo, poste iris ioman distancon en la direkto, de kie li antaŭe venis, haltis denove, fine turnis sin kaj decide iris pli suden. Post nemultaj paŝoj li venis al arbara vojeto, sur la orienta flanko de la granda vojo, kaj sur tiun li eniris.

Li iris singarde silente kaj atente rigardis ĉirkaŭ si. Li troviĝis ne malproksime de la hejmo, kaj la fratino povus esti elirinta por kolekti berojn. Sed li renkontis neniun.

Jen la vojeto komencis konduki krute supren, kaj ĝi fariĝis pli kaj pli mallarĝa. Fredriko iris tre malrapide, ne pro peno sed pro absorbiĝo en pensoj aŭ sentoj. Li preskaŭ neniom atentis pri la mondo ĉirkaŭ si.

Post duonhora supreniro li troviĝis sur la verto de monto kun disaj kaj nealtaj arboj, kaj de tie li vidis la tutan regionon. Li iom rigardis al ĉiuj flankoj kaj poste longe kaj fikse rigardis al la loko, kie liaj laboriloj kuŝis neuzataj. Poste li sidiĝis sur roko kaj denove rigardis la horloĝon. Nun estis la deka horo.

Fredriko estis malgaja. La frumatena duonsongâ mensostato estis for kaj same la posta ekscitita stato. Li klare perceptis sin mem kaj kiel laborulon kaj kiel forkurinton de la laboro. Li ne faris al si riproĉojn kaj ne pentis pro sia foriro,

kaj li ne zorgis pri tio, kion diros la homoj, se ili ekscios pri lia ekskurso. Sed li ne trovis, kion li serĉis. La feliĉa sento de libereco, kiun li sentis aŭ kredis senti dum la momentoj de la duonsongâ ekzalto, tre baldaŭ estingiĝis, kaj anstataŭe li pleniĝis de prema malgajo. Li ne kapablis senti sin feliĉa kaj samtempe liaj laboro kaj ĉiutaga vivo ŝajnis al li eĉ pli neelteneblaj ol antaŭe.

Li klopodis klarigi al si sian situacion, formuli la problemon kaj trovi solvon. Sed li ne sukcesis. Je la dekunua horo li komencis iri malsupren en direkto al sia laborloko. Li estis laca, kaj lia kapo doloris.

Kiam li denove estis en ebena tereno sed ankoraŭ troviĝis en la arbaro, li ekaŭdis antaŭ si kantadon. Estis maljunula sed tamen klara kaj agrabla voĉo. Ĝi ne estis laŭta sed la elparolo estis klara, kaj Fredriko baldaŭ povis distingi la vortojn. Estis malnova religia kanto, kaj la kantanto kantis, ke li estas ĝoja kaj kontenta, ke lia tempo de sklaveco finiĝis, ke nun li povas libere spiri, ĉar li vivas ĉe sia Patro. La voĉo vibris de varma ĝojo, kiu atestis, ke la kantanto mem efektive sentas tiun ĝojon kaj liberecon.

Fredriko rekonis la voĉon kaj komprenis, ke estas maljuna, religia ŝuflikisto, kiu loĝas en dometo ĉe la rando de la arbaro sur tiu ĉi flanko de la valebeno. Post nemultaj paŝoj li alvenis al li. Li sidis sur granda ŝtono apud la vojeto, kun la manoj ripozantaj sur la genuo kaj la rigardo direktita al la blua alto. Apud li staris korbo kun bluberoj. Li tuj rimarkis Fredrikon, sed trankvile finkantis la lastajn vortojn de la strofo.

— Bonan tagon! salutis Fredriko.

— Bonan tagon kaj paco al vi! respondis la maljunulo afable kaj iomete solene. Ĉu ankaŭ vi kolektas berojn?

— Nee . . . li respondis, hezitante pri la daŭrigo. — Vidu, Aŭgusto, mi ne iris por labori hodiaŭ matene, ĉar mi volis esti libera almenaŭ unu tagon de tiu ĉi somero, volis iri al la lago por bani mia kaj iri en la arbaro, ĝui de la naturo kaj senti, ke nun sole mi mem decidas pri mi kaj miaj faroj.

— Estas prudenta penso, diris Aŭgusto. Ordinare la homoj estas tiel ligitaj al sia laboro, kvazaŭ ili estus naskitaj por esti sklavoj.

— Sed estas strange, daŭrigis Fredriko. Neniun ĝojon mi spertis, kaj neniel mi sentas min feliĉa pro libereco. Kaj samtempe mia laboro ŝajnas al mi okupo de sklavo.

— Sidigu vin, amiko, kaj ni interparolu iomete, diris Aŭgusto kaj invite montris al apuda ŝtono. — Ŝajnas al mi, ke via imago pri libereco estas tiu, kiun la homoj ĝenerale havas. Oni volas laŭplaĉe disponi pri sia tempo kaj siaj faroj. Sed tio estas nur besta libereco, libereco por la korpo. Ĝi povas esti bona, se ĝi estas uzata en la servo de libera animo, sed se estas ne tiel, ĝi povas esti eĉ danĝera. Ĉiokaze tiu libereco ne estas grava, kaj sola ĝi ne povas fari la homon feliĉa — kontraŭe.

Vidu, via korpo ne estas vi mem, vi vera memo estas tio, kion vi interne sentas, via animo, kiel ni diras. Via laboranta korpo kaj la spirito en ĝi estas nur okaza kunligaĵo. Kio do estas pli grava? Kaj kiu speco de libereco estas esenca? Ĉu vi komprenas?

— Mi komprenas vin, jes. Sed kiel ekhavi liberan animon, tiel ke oni ne plu sentas la sklavecon, en kiu troviĝas la korpo?

— Ne tiel, amiko. Oni ne serĉas la spiritan liberecon, por ke oni ne sentu la dependecon en aferoj, kiuj rilatas al la korpo. Estas la unua, kiu en si mem estas grava, la dua ne.

— Nu, sed kiel akiri tiun liberecon?

— Estas graco de Dio. Sed kie troviĝas sopiro kaj serĉado, tie venas la graco, kaj la homo vekigigas. Ni nomas tion vekigo, kaj prave. Oni subite kvazaŭ vekigigas el songo, fariĝas konscia pri sia vera memo kaj pri tio, ke la senco de la vivo estas kuniĝo kun la plej alta bono, kun justo kaj amo, kun Dio, kaj en tio oni trovas sian ĝustan lokon en la ekzisto, trovas celon por la vivado kaj trovas sencon en ĝi. Jen kio estas libereco. Alia libereco ne ekzistas, kaj se oni nomas ion alian libereco, tio estas pro nekomprene. Sed kiu estas vere libera, li estas libera eĉ se li laboras kiel sklavo kaj en feraj katenoj. Li estas tiel libera, ke li propravole povas eĉ fordoni sian korpan vivon, por ke li ne rompu sian kuniĝon kun Dio.

Fredriko ne demandis plu, sed li restis sidanta dum kelka tempo, meditante pri la vortoj de Aŭgusto.

Je la dekdua li revenis al sia laborloko. Li tagmanĝis same

kiel en aliaj tagoj je tiu tempo kaj poste ripozis en la ombro de kelkaj arboj ĝis la unua horo. Tiam li rekomencis sian laboron.

Je la tria horo venis la vagulo laŭ la vojo, kie Fredriko laboris. Tiu ne tuj rimarkis lin, kaj la vagulo haltis iomete en kelka distanco de li kaj scivole rigardis lin. Poste li aliris. Fredriko rimarkis lin, kaj dum kelkaj momentoj ili silente rigardis unu la alian.

— Ĉu vi rezignis pri la libereco? demandis fine la vagulo en iomete pika tono.

— Mi ne trovis ĝin, kie mi serĉis. — Ĉu vi jam iris viajn dudek kilometrojn hodiaŭ?

— Ne, mi restis por vidi, kio okazos al vi, kaj mi meditis pri nia interparolo en la mateno. — Vi ne trovis, kie vi serĉis? Ĉu tamen trovis?

— Pia homo parolis kun mi. Se mi interpretas liajn vortojn laŭ miaj pensoj, ili signifis, ke la homo por senti sin kontenta devas havi sencon en sia ekzisto, iun pli altan sencon, kiun tiu viro nomas kuniĝo kun Dio, kaj ke la homo devas vivi laŭ tiu senco.

— Kaj en tio vi trovis la liberecon?

— Ŝajnis al mi, ke mi rekonis liajn pensojn kiel pensojn, kiujn mi jam havis en mi mem, kvankam mi antaŭe ne atentis pri ili. Kaj mi kvazaŭ vekigis kaj fariĝis konscia pri mi mem.

— Kaj en tio vi trovis liberecon?

— Mi kvazaŭ ekvidis vojon, kaj alian vojon mi ne vidas, por ke homo povu vivi kontente. Kiam mi estis infano, la sencela vagado sufiĉis por mi, kaj en tio estis libereco sufiĉe. Sed nun mi bezonas sencon kaj celon, kaj en tio estas libereco. — Sed sidigu tie ĉi, amiko! Vi povos trinki ankoraŭ tason da kafo, kiam mi nun mem trinkos, ĉar mi neniom trinkis dum la tuta tago, kaj ankaŭ manĝaĵon kaj lakton vi povas ricevi.

Ili sidigis sin sur la herbon, kaj Fredriko diris:

— En la mateno vi demandis, kial mi laboras, kaj mi respondis. Mi demandis, kial vi vagas, sed vi ne respondis.

La vagulo respondis post ioma silento:

— Tion mi mem ofte demandis al mi. Ŝajnas al mi, ke vi mem respondis al tiu demando.

Kiam ili sidis tie en la kvieto de la frua vesperiĝo, aŭdiĝis subite la sonoriloj de la preĝejo. Fredriko kun duona atento al la sono pensis, ke okazas enterigo. Sed la sonorado pludaŭris, monotona kaj iel timiga.

— Kion signifas tio? demandis Fredriko.

— Vi ne legis gazetojn hodiaŭ? diris la vagulo.

— Ne.

— Sed vi legis dum la lastaj semajnoj kaj tagoj kaj scias, kio okazis en la mondo?

— Nu, jes...

— Mi legis la lastajn gazetojn hodiaŭ kaj ankaŭ aŭdis pri telefonaj informoj. Ĝenerala milito ĵus komenciĝis. En nia lando la sonoriloj de ĉiuj preĝejoj vokas la virojn por defendi la landon, se estos necese.

La sonorado pludaŭris preme malgaja.

— Kaj estos milito kiel neniam antaŭe, diris la vagulo. Mal multe da kompreno povas antaŭvidi tion. Milionoj milionojn mortigos, la kreaĵojn de la homaj pensado kaj laboro oni detruos, homoj fariĝos bestoj kaj diabloj. Kaj jen sidas ni, du malgrandaj homoj sub la ĉielo. Kion vi nun diras, amiko?

Fredriko estis skuita de la novaĵo. Li silentis kaj kvazaŭ sumis siajn pensojn kaj poste diris:

— Tamen mi restas, kiu mi estas, kaj alian vojon ne vidas. Kial mi do ne iru ĝin, eĉ se la mondo detruigus?

William Auld:

Unu el ni.

Sidas sub lampo.

Legas librojn.

"Edukiĝas".

Fariĝas ĉiutage pli ĉifona.

Tri tagojn lasas ŝimi

sian barbon.

Dek jarojn lasas ĝibi

siajn ŝultrojn.

Senzorge lasas kokri lin l'edzino,

Kaj ĉiutage pli malrisortiĝas

Ĝis iam miro estas jam maroto,

Kaj, kvazau nuda marmolusk' en konko,

Li timas trudi kapon en eksteron.

Kaj tro malfrue

Konstatas, ke nenion li plenumis,

Repensas al iama knab' sincera

Kies intenco arda ne sufiĉis.

Kaj

Sidas sub lampo.

Legas librojn.

Kadukiĝas.

Maroto — "amata ĉevaleto".

Kolomano Kalocsay ĉe la limo.

Al la Skota Skolo

Oni diras, ke la stoika imperiestro Marko Aŭreljo, meditante pri sia vivo, komence faris inventaron de siaj kvalitoj kaj virtoj, de la daŭraj havoj de sia animo; kaj ke li notis, kiel en kontraŭdirekta testamento — danka testamento supren en la vivofluon —, la nomojn de tiuj, kiuj postlasis al li tiajn heredaĵojn. Tre decus, ke ĉiu generacio faru simile, kiel kavalireca kolektiva honorigo al siaj indaj praintoj.

Se montriĝos fakto la onidiraj sciigoj, ke Kolomano Kalocsay, la princo de nia poezio, jam sesdekjarulo, forkabeĝis de nia movado, ni neniel povus pli noble nin kuraci je la granddolora elŝiro, ol irante supren en la fluo de nia lingva kaj beletra riĉiĝo. La rezulto de tiu spirita promeno estus nur danka konstato de eminenta, grandioza bonhavo en nia literatura aktivo.

Dum kvardek jaroj, Kalocsay plenpasie laboris por esperanto, kor-solidare kroĉita al ĝi; kvardek jaroj — du trionoj de sia vivo —, kiujn li pasigis surpostene gardante nian lingvon, sopirante al ĝi tra la ŝtormoj de du mondmilitoj kiel al malapuda amatino, sin azilante en ĝi kiel en prefera rifuĝejo...

Post la morto de la triaperioda "Literatura Mondo", lia ekzempliga vorto de majstro ne sonis plu. Li estis giganto; lia kontakto, lia ĉeesto en la movado instruis nian lingvon poezii, kiel ekzemple Dante la italan; lia beletra strebado sorĉmagie fokusadis niajn literaturemulojn al ĉiam pli altaj suproj en ilia opa kreado. Post paso de generacioj, kiam historiisto de nia beletro faru etaton de nia literatura havo, li nete konstatos kiom nia lingvo atingis danke al Kalocsay, kaj kiom negative estus pezinta lia malesto.

La lasta generacio, kiu rekte ricevis la stampon de Kalocsay, estas tiu de la skota skolo; ĉi ties ŝuldo al la majstro estas pli granda ol oni povus unuarigarde kredi, kaj la historio montros je kiom granda manko ne posedos ĝin la sekvantoj. Sed la tributa danko de la skotoj estas la plej elstara, la plej konsekvenca ĝis nun oferita al iu nia forpasinta majstro: ĝi aperas en tio, ke oni prenas stafete la torĉon de la budapeŝta bardo kaj pluportas ĝin al unua reflagro per la trezora libro **K v a r o p o**.

Kalocsay staras nun ĉe la limo, inter sia esperantista aktiveco, ŝajne ho ve ĵus finiĝinta, kaj la vivo de la famo — renomo, speciala ĉapitro en la historio de nia literaturo, monografioj, ktp. Nia poeto, de nun, vibrados reeĥe, kun la vibro de ĉiu sekvonta leganto, de ĉiu sentema spirito atingota de liaj klaraj, diafanaj, mirindaj versoj. Kaj jen do kiel lia nun ŝira kabeĝo fariĝos iom post iom akcidento, efemeraĵo, ĉar

li ja testamentis al Esperantujo sian plejnoblon en la sonoro, majesto, harmonio de bone kaj bele, inde farita laboro.

Homojn oni devas mezuri laŭ kvalito kaj sumo de iliaj trafoj, ne laŭ nombro kaj grandeco de iliaj faloj. Kalocsay sin plenrajte dignigis en Esperantujo, ĉar li amis nian lingvon tiom zorgeme, tiom delikate kvazaŭ ĝi estus lia propra animo iĝinta belsona verkŝtofo. Kaj tiel li atingis, post la povro de la aktuala kaj la ŝancelo de la transa, kion poetoj plej espereme revas: trian vivon — tiun de la famo ĉiamdaŭrema.

Dediĉo.

Poetoj ŝprucas el fonto de liutoj, kiujn iliaj popoloj akceptas; kaj ĉiu forpasinta poeto transdonas en la manojn de aliaj poetoj, kvazaŭ heredaĵon, kantelon, kiu venas pasante de la eterneco de la nenio ĝis la disaj koroj de la posteuloj. Antaŭ la ombro de foririnto, jen leviĝas kvar, kiel kontraŭ la ombro de tiuj kvar morgaŭ leviĝos pluaj aliaj.

Via voĉo, skotaj amikoj, ŝprucas el la sama vervejo kiel la budapeŝta. Kio mankas pro la mutiĝo de la kaloĉaja gitaro, tion ni trovas en via. Kalocsay kaj vi donis al ni veran poezion. Kaj ni, la esperantista popolo, nutras kaj vastigas nian bruston per viaj noblaj verkoj. Ĉiu popolo aŭskultas siajn poetojn kun oreloj kaj animoj apertaj, je la sojlo de ĉiu generacio. Via destino estas iri al la manoj de via popolo. Ni atendas...

J. Régulo Pérez
Kanariaj Insuloj

Debato.

Respondo al Rudolf Anders.

1.

En sia respondo al mi s-ro Rudolf Anders diras, ke mi konfuzas la faktojn. Li kulpigis min pri tio, ke mi rigardas

la Arabojn kiel invadintojn kaj uzurpantojn al la Palestina lando.

Jes, mi havas tian opinion pri la Araboj. Kaj certe R. A. komprenos, kion mi opinias.

Li scias tiel bone kiel mi, ke la Araboj, gvidataj de la kalifo Omar, konkeris Palestinon propagandante por Islamo per la glavo. Li ankaŭ scias, ke en nia tempo la Judoj pace konkeris la Sanktan landon, kiu laŭ promeso de la Angloj estu la nova hejmo de la Judoj. Li ankaŭ scias, ke la Araba ligo provis elĵeti la Judojn.

La batalo de la Judoj por sia vera hejmo havas mian plenan simpatian.

Kiel ofte antikvaj historiistoj naive donis al siaj dioj homajn trajtojn, tiel Jehova en la Malnova Testamento ricevis ankaŭ homajn, ne ĉiam simpatiajn ecojn. Por konstati tion ne estas necese legi Aldous Huxley. Sed en la Malnova Testamento troviĝas "La Profetoj", kiuj havas grandan valoron, speciale la profeto Jesaja, kiun Jesuo tre amis. Ĉe li oni trovas multon de tio, kion Jesuo predikis.

En ĉiu tekstkritiko, ankaŭ en la Biblia, estas leĝo, konservi la pli malfacilan tekston, "lectionem difficiliorem" kiel la pli bonan, ne forĵeti ĝin kiel falsan, ĉi tie apokrifan, se estas malharmonio. Sed feliĉe por la interpretisto ne estas iu kontraŭstaro inter la verso 5,17 ĉe Mateo kaj la sekvantaj versoj. En ĉi tiuj versoj Jesuo volas montri, ke oni devas interpreti la leĝon en la spirito de la amo, ne kiel servisto de la litero. La saman batalon kontraŭ la laŭlitera interpreto oni trovas ĉe Jesaja.

Malklaraj estas jenaj vortoj de R. A.: "se Jesuo, la ne juda aramee parolanta Galileo estis veninta por plenumi la judan leĝon, kial do la skribistoj kaj Fariseoj persekutis kaj mortigis lin?"

Ĉu R. A., havas la falsan opinion, ke Jesuo kiel Galileo parolis la Aramean lingvon, dum la ne-Galileoj ne parolis ĉi tiun lingvon? — En la tuta Palestino en la tempo de Jesuo oni parolis la tiel nomitan Okcident-Aramean lingvon.

Ĉu la vorto "nejuda" signifas, ke Jesuo ne estas Hebreo, sed Greko? Au ĉu signifas la vorto nur iun ripetadon, ke Jesuo

estas Galileo kaj ne naskita en tiu parto de Palestino, kiu nomiĝis "Judaea"?

La skribistoj kaj la Fariseoj ne mortigis Jesuon sed Pilatus, la reprezentanto de la Roma potenco, krucumis lin kiel ribeliston. Rigardata per Romaj okuloj li estas tia homo post la popola ovacio Palmdimanĉon. Kiam li purigis la templon parte citante Jesajon 56,7, li fariĝis malamiko de la viroj de la Juda religia societo kaj de ili, kiuj profitis el ĝi.

Certe vi pravas, sinjoro Rudolf Anders, konsiderante kruela la punon aŭ venĝon, "Okulo pro okulo". Sed tio estas nenio komparata kun la verdikto: eterna restado en la Inferaj flamoj, pri kiu la Nova testamento rakontas.

Kaj nun kredante, ke nia diskutado pri la religio ne firmigos la Esperantistan fratecon, mi ne emas diskuti plue.

Nils Christensen

2.

Kun intereso mi legis la respondon de Sro Rudolf Anders al Sro Nils Christensen. Kvankam mi ne havas antaŭ mi la cititan artikolon "Sendankeco", mi bone informiĝis el la artikolo de Sro Anders pri la temo, eligi la Malnovan Testamenton el la Biblio por la Kristanoj.

Mia peto al la Redaktoro estas, ke li finu la debaton pri tiu temo. Mi ne volas doni detalajn motivojn pri tiu problemo; tio prenis tro da spaco en MR. Sed por bona kompreno de miaj pensoj mi konstatas, ke mi ne apartenas al iu ajn religia sistemo nuntempa kaj ke mi ne estas Judino. La lastan mi diras nur, ĉar eble oni povus supozi, ke Judo sin defendas. Por mi ekzistas nur homoj aŭ homaj amasoj, kiuj estas respondecaj pri siaj agoj antaŭ sia propra konscienco kaj antaŭ la tuta homaro.

La motivoj, kiujn donas Sro Rudolf Anders estas — simple kaj klare dirite — antisemitismaj. Mi estas Germanino. Ĝis la fino de mia vivo mi sentos min respondeca pri la kruelaĵoj kaj pri la amasmurdo kaŭzita de la Hitlera Germanujo. Kvankam mi estis arda kontraŭulo de la Hitlera sistemo, mi ĉiam sentos tiun "koletivan kulpon"; se la Germanoj ne ŝatas tiun esprimon, ili almenaŭ sentu "kolektivian honton".

Bedaŭrinde tiun senton de kolektiva honto la Germana Registaro esprimis publike nur multajn jarojn post la milito. Mi senpacience atendis tiun geston jam de 1945.

La lasta alineo de la artikolo de Sro Rudolf Anders memorigas al mi la artikolojn en la "Stürmer" de la Hitlera tempo. Ĝi ne taŭgas por Esperanta Revuo kultura.

Denove mi direktas la peton al la Redaktoro de tiu ĉi gazeto, fini la diskuton pri la Malnova Testamento.

Elisabeth Bünemann.

Parolo al aliopiniulo.

De K. Wilgenhof

Pri multaj aferoj ekzistas tre multaj ekstreme diversaj opinioj. Se vi komencas debaton kun mi — mi ĉiam opinias ke oni ne debatu, sed facile forgesas tion dum debato — vi baldaŭ konstatos, ke mi havas tute erarajn konceptojn, kaj ke pro ia abomena obstineco de mi saĝa homo ne sukcesas konverti min al pli bona, se ne la ununure ĝusta, do la via, vidpunkto.

Ĉe ĉiu via argumento mi levas kontraŭargumentan respondon, kaj estas kompreneble, ke vi sentas kiel vian devon ne cedi al tiu netolerebla situacio kaj ĉiam rebatas per kontraŭa kontraŭargumento. Tiel ni ambaŭ estas devigataj kontinuiĝi nian pafadon de argumentoj, ĝis eksteraj cirkonstancoj — forirtempo de vagonaro, tertremo aŭ iu alia ĝeno — devigas nin ĉesi.

Kompreneble mi tute ne estas devigata daŭre kontraŭargumenti, se mi nur volus kompreni, aŭ almenaŭ akcepti sen kompreno, vian starpunkton. Sed ĝuste tion mi ne povas fari. Malgraŭ niaj diferencoj ni ja havas tion komuna ke, same kiel vi, mi firme konvinkiĝis pri la ĝusteco de la propra koncepto. Laŭdinda firmeco ĉe vi, naŭza obstino ĉe mi.

Supozeble vi kredas, ke oni ne bone edukis min, kaj pro

tio mi ne akiris sufiĉe klaran komprenon pri la aferoj de la mondo. Nu, mi povas konsenti al vi almenaŭ pri tio, ke via edukiĝo verŝajne estis alia ol la mia. Kaj tiukaze vi pravas, se via koncepto pri bona kaj malbona edukadoj estus la ĝusta. Sed ion pli mi ne povas konsenti al vi. Kaj ankaŭ edukado povus esti temo de debato inter ni.

Verdire mi trovas, ke mia vidpunkto estas bona. Se vi diras, ke nur unu el via kaj mia opinioj povas esti la ĝusta, mi tamen opinias, ke ne la mia estas malĝusta. Ĉar ĝi estas tiom kara al mi. Imagu, ke vi vere sukcesus venke depreni de mi mian karan opinion; mi sentus kiel homo nedece vestita en societo. Sed tion vi verŝajne ne povas kompreni.

Kompreneble vi kredas, ke la kriterio, ĉu iu penso estas aŭ ne estas ĝusta, troviĝas ĉe via flanko. Do estas facile; se estiĝas kontraŭeco inter via kaj mia opinioj, vi estas kapabla prijuĝi, kiu pravas. Kaj sendube vi faros tion tute neŭtrale kaj objektivite laŭ via vidpunkto. Do mi ne bezonas dubi, ke vi juĝas vian opinion la korekta.

La malfacilo troviĝas nur en tio, ke mi ne povas akcepti tion. Mi opinias, ke mi ĝuste opinias, sed povas esti, ke mi — pardonu — ke vi pli pravas ol mi. Mi volas klopodi ne malkontentiĝi sub tio, sed almenaŭ lasu al mi mia n pravon. Kaj se ne povas esti alie, tenu vi la vian. Ni restos rigardantaj unu la alian kiel strangan nesaĝan homon, kiu estas senesperiga obstinulo aŭ stultulo, kaj la vivo iradas plu. Ĉar la vivo havas propran opinion, kiu ĉiam estas alia ol la niaj.

Literaturo.

F. Omelka: Alaska stafeto kaj Kaptitoj de la glaciokoj.
Bind. prezo 6 ŝilingoj, afr. 4 p.
Eldonis: The Esp. Publishing Company.

La supre nomitaj du rakontoj aperis originale en Esperanto, la revuo de UEA, kaj estas nun haveblaj en formo de plaĉa kaj bone bindita libro.

La rakontoj estas aventuraĵoj, kaj mi supozas, ke la aŭtoro

skribis ilin unualoke por junaj legantoj. La unua enhavas mirindan materialon por aventura rakonto de alta literatura valoro, sed ŝajnas al mi, ke la verko ne respondas al la ebleco de la materialo. En bona rakonto la okazoj mem devas doni al ni impreson de malfacilaĵoj kaj penado, de persisto, grandanimeco kaj heroeco. La aŭtoro mem emfaze atentigas la leganton pri tiaj aferoj, sed la personoj kaj la okazoj mem faras malmulte da impresoj. Estas multe da dialogoj, kiuj en la stilo tro multe similas al dialogoj de esperantaj kunvenoj. — La esprimo "25-kilometra kvadrato" en la antaŭparolo estas ne taŭga. Se oni eventuale esprimas sin tiel en iu lingvo, esperanta leganto tamen ne povas scii, ĉu temas pri 25 kvkm, ĉu pri kvadrato kun 25-kilometra flanko, ĉu pri kvadrato, kies 4 flankoj havas 25 km. — Gunnard Kasson estas stranga unikaĵo inter svedaj nomoj.

La konstruskeleto por la dua rakonto estas pli aventurnovele ŝablona sed taŭga por tia verkaĵo. La literaturaj mankoj de la unua rakonto troviĝas ankaŭ en la dua.

Al tiu prijuĝo el literatura vidpunkto mi aldonas, ke la lingvo estas simpla kaj korekta, kun tre mallongaj frazoj, ke la aŭtoro rakontas vigle kaj ke troviĝas multe da aventurrakonta materialo en la volumo. Mi tial sincere rekomendas la libron al daŭriĝaj kursoj kaj similaj studrondoj kaj cetere al ĉiuj, kiuj legas por lerni la lingvon. Por tia celo ĝi estas bonega.

S. E.

William Shakespeare: Trojlo kaj Kresida.
Proze tradukita de Stephen A. Andrew.
Prezo 2 ŝil. 6 p., afr. 2 p.
Eldonis The Esp. Publishing Company.

La lingvo en tiu ĉi nova traduko de Stephen A. Andrew estas flua kaj facile legebla. Proza traduko donas avantaĝojn kaj al la tradukanto kaj al la legantoj. Ke en la prozo ne malofte troviĝas nekutima vortordo kaj versa ritmo, tio certe apartenas al konscia, intenca esprimmaniero de la tradukinto. Mi supozas, ke li volas tiel doni iom arkaikan nuancon al sia lingvo. Mi ne estas certa, ke li sukcesis — ankaŭ ne, ke li malsukcesis. Pri tio juĝu la estonto.

La tradukinto diras en sia antaŭparolo, ke Shakespeare naskiĝis "el gepatroj relative nebonhavaj aŭ mone aŭ mense". Sen pretendi superecon de mia esprimado mi preferus: "de gepatroj kaj mone kaj mense relative nebonhavaj". Iom stranga ŝajnas la informo pri Shakespeare en la fino de la sama frazo, ke li "ne longe poste mortis tie en 1616 okaze de la 52a datreveno de lia naskotago".

S. E.

Por nova afero, nova maniero.
(Kolekto de noveloj el El Popola Ĉinio)
La plej forta voĉo de la paco.
(Kolekto de poemoj el El Popola Ĉinio)
Ambaŭ librojn eldonis Fremdlingva Eldonejo, Peking.

La unua el la supraĵ du libroj estas simpla sed plaĉa malgrandformata volumo de ĉirkaŭ 200 paĝoj. Ĝi enhavas dektri novelojn (aperigitajn antaŭe en El Popola Ĉinio) de modernaj ĉinaj verkistoj. Krome troviĝas en la libro antaŭparolo, bibliografiaj notoj pri la aŭtoroj kaj klarigoj pri vortoj kaj esprimoj.

La rakontoj estas el kamparaj medioj kaj donas bonajn bildojn de homoj, problemoj kaj klopodoj dum la komenca kreado de nova stato en la malnova lando. Ili ne apartenas al tre altnivela literaturo, tamen apartenas al tre bona literaturo. Ili estas en plej bona senco realismaj, konkretigas al ni per malmultaj vortoj mediojn, situaciojn kaj homojn, kaj la simpla, epika rakontado estas agrabla kontrasto al granda parto de modernaj okcidentaj verkoj. La konatiĝo kun tiuj ĉinaj kamparanoj estas agrabla. Mi efektive ŝatas tiujn homojn. Se la homoj ĉie en la mondo komprenus aŭ kapablus solvi interhomajn malfacilaĵojn kaj konfliktojn kun tiom da prudento kaj bonkoreco kiel ili, la mondo aspektus tute alia, ol ĝi nun aspektas. Kvankam la noveloj estas tendencaj, oni preskaŭ tute ne parolas pri doktrinoj sed pri realaj ĉiutagaj malfacilaĵoj kaj problemoj kaj pri la praktika solvo de ili.

Ni ekster Ĉinujo malmulte scias pri la homoj kaj la agado en la ĉina novkonstruado. Se ili estas tiaj, kiaj montras ilin

al ni tiuj noveloj, ili havos sukceson, kaj ni deziru al ili bonan prosperon.

Iom strange impresas al mi la fina frazo en la antaŭparolo: "Kaj sekve mi kredas, ke tiu ĉi broŝuro estos forta respondo al la imperiistaj militprovokantoj, kiuj kalumnias la ĉinan popolon per senhontaj mensogoj." Mi sufiĉe zorge legas gazetojn de diversaj specoj, sed mi efektive ne vidis malfavorajn eldirojn pri Ĉinujo. La sola escepto estas la eldiro de sro Dulles, kiun mi citis en recenzo en nro 2/1952 de MR, ke Usono ne povos halti, kiam ankoraŭ troviĝas komunisma regado en Ĉinujo. Tia eldiro atestas pri doktrina malamikeco, povas eventuale atesti ankaŭ pri imperiismo. Certe tiu eldiro tamen ne reprezentas la ĝeneralan usonan politikan sintenon rilate al Ĉinujo, kaj ĉiuokaze ĝi ne estas kalumnio kaj senhonta mensogo.

La lingvo en la tradukoj plaĉas al mi. Ĝi estas bona, kaj ĝi estas korekta, kaj iu malofta neglataĵo ne povas forigi la impreson, ke la tradukantoj estas pli proksimaj al la lingva spirito de esperanto ol multaj tradukantoj kaj verkantoj en Eŭropo.

En la poemkolekto troviĝas multaj versoj, kies poezio brilas kiel roso sur freŝa herbo, kaj kies pensoj vibrigas la koron. Ili estas parencaj al la iamaj grandaj poemoj de Ĉinujo. Troviĝas aliaj plenaĵoj de indigno kaj malamo. Oni devas respekti ilin. Troviĝas aliaj, kiuj estas nur erupcioj de insultoj. Unu poemo tre iluzie memorigas pri ĥora bojado de koleraj hundoj. Tiaj poemoj nek pliriĉigas poezion nek akcelas pacon aŭ justecon. La plej grava efiko de insultado, eĉ se direktita al plej granda fripono, estas malnobligo de la insultanto mem.

La rimarkigoj pri la lingvo en la noveloj validas ankaŭ por tiu de la verstradukoj. En "Ne estas, ke neniu..." aŭ la duobla negacio devas esti erara, aŭ la senco estas tiel malklare esprimita, ke mi ne povas kapti ĝin.

La recenzaj ekzempleroj ne havas prezindikon. Sed certe ĉiuj librosservoj kaj eldonejoj peradas la librojn kaj ankaŭ informas pri la prezo.

S. E.

Joseph F. Berger: Niko kaj Nina.
Prezo 2,40 gm + 10 % por afr.
Eld. Esperantofako de Limburger Vereinsdruckerei.

Niko kaj Nina estas "postkursaj legolibretoj originala", do libro por daŭrigaj kursoj aŭ propra studo de komencantoj. Estas libro tre bona por sia celo. — "Geinfanoj" devus ne troviĝi en tia libro nek aliloke. "Kompreneme premante ŝian manon" signifas, ke li (temas pri Niko) premis ŝian manon kun emo kompreni. La senco ŝajnas esti "komprene, kun kompreno". Mi rapide tra legis la libron kaj ne atentis pri tiaj aferoj. Verŝajne troviĝas ankoraŭ iuj tiaj neglataĵoj, sed esence ili ne gravas. La esprimado ĝenerale estas simpla kaj klara. La esprimo "...prenis malgrandajn meblojn tie troviĝantajn" estas escepto. Verkisto de lingvaj lernolibroj certe diras, ke lernantoj devas konatiĝi ankaŭ kun tiaj esprimmanieroj. Laŭ mia opinio oni plej bone servas al la lernanto, se oni uzas la plej simplajn kaj bonajn esprimojn. Komplikitaj esprimoj igas lin kredi, ke tio estas bona stilo, kaj ke oni devas esprimi sin tiel. Por akiri ĝenerale simplan kaj bonan esperantostilon estas necese instrui tian stilon al la lernantoj. Nenecesajn komplikaĵojn kaj eĉ absurdajn ili poste renkontas en kvanto plene kontentiga. Afable atentu, ke la lastaj rimarkigoj estas principaj kaj ne signifas kritikon al Niko kaj Nina.

Laŭ mia sperto estas manko de libroj de tiu ĉi speco, kaj tial ĝi estas tre bonvena. Ĝi estas uzebla en ĉiuj landoj.

S. E.

Wilhelm Theodor Oeste: Esperanto Mittler der Weltliteratur (Esperanto — peranto de la mond-literaturo).
Prezo 4,50 gm.
Eld. Siegfried Ziegler Verlag, München-Pasing.

Tiu ĉi libro volas konigi esperanton al eksteruloj kaj montri ĝian perfektan kaj superecon. La entuziasmo de la aŭtoro estas granda kaj lia fervoro laŭdinda, sed mi dubas pri la metodo kaj la rezulto. En ĉapitro pri la strukturo de la mondlingvo li prezentas tre multe da sekaj gramatikaĵoj kaj multe da tre komplikaj esprimformoj. Por montri la esprim-

kapablon de esperanto li konstruis per la radiko help' kaj afiksoj pli ol 200 vortojn, kiuj grandparte estas monstroj: ekrehelpeti, ekrehelpegi, fihelpetadi, fihelpegadi, helpegaĉadi, helpegadeco, helpilego, helpulinaestrino, helpemadeco — kaj aldonas, ke oni povas konsiderinde pliampleksigi la liston. Mi ne scias, ĉu tia prezento de esperanto estas konvena por germanaj eruditaj de malnova profesora tipo, sed en la pli multaj aliaj landoj ĝi certe forigus la homojn de esperanto kaj ridindigus la lingvon. La lasta duono de la libro konsistas el poemoj el multaj lingvoj, de Homeros ĝis la nuna tempo. Ili estas redonitaj en la originala teksto, en la germana kaj en esperanto. La plej alta laŭdo, kiun oni povas doni al iuj el la esperantaj tradukoj aŭ partoj de ili, estas, ke ili estas akcepteblaj. Multaj ne meritas tian ateston. Jen Bjørnson: "L' unua dolĉrenkonto / jen kiel kant' arbara / jen kiel kant' surmara / dum sunruĝsink' en l' ondo". Kaj jen La gurdoviro de Wilhelm Müller: "Jen post la vilaĝo staras gurdovir' / per rigidaj fingroj turnas en penspir'. / ŝanceliĝas sur glaĉi' kun nuda pied' / kaj malplenrestadas lia teleret'." / "Kial prezenti palpajn diletantaĵojn kiel perfektaĵojn de tradukarto?"

S. E.

Evangelia kantar.
Kristana Esperantista Eldonejo, Örebro.
Prezo sv. kr 2,50 plus afr.

Tiu ĉi kantlibro estas tre bela volumeto kaj enhavas 50 kantojn — tekstojn kaj melodinojn — en agrabla preso. La lingvo ŝajnas al mi kontentige bona kaj natura ankaŭ en strofoj, kies ritmo necesigis sufiĉe multe da apostrofado. Iuj tradukoj el la sveda, de Magda Carlsson — temas pri himnoj, kiuj apartenas al la plej altvalora sveda poezio — estas preskaŭ en ĉio perfektaj. — Recenzisto en Dia Regno trovis, ke la komenca linio en nro 23 "Nun ĝoje mi kontentas" nepre estas malplibonigo de antaŭa traduko "De nun mi ĉiam festos". Antaŭ preskaŭ kvindek jaroj mi tre ofte aŭdis tiun kanton de malriĉaj kamparaj homoj, kaj ŝajnis kaj ankoraŭ ŝajnas al mi, ke la vortoj (svede, laŭvorte: Nun mi estas ĝoja kaj

kontenta) perfekte esprimas la senton aŭ eble mi diru humoron de vera kristano. Se oni estus proponinta al ili kanti "De nun ni ĉiam festos", la kanto certe ne estus same bone espriminta iliajn sentojn. "Goje kontentas" efektive ne tute bone redonas "ĝoja kaj kontenta", tamen la vortoj ŝajnas al mi pli veraj kaj bonaj ol "festos". Kaj troa uzo de superlativaj vortoj malfortigas ilian forton kaj nian senton por verama esprimado. Eĉ la plej fidela kristano ne ĉiam sentas la vivon kiel feston, sed ĝoja kaj kontenta li povas esti eĉ en malfacilaĵoj kaj doloroj.

Tian kantlibron aperigis la relative negranda organizo de kristanaj esperantistoj. La kantoj jam ekzistis, kaj ilia enhavo estis universala, sed tamen... Esperanto ekzistis jam sesdek jarojn, sed la tuta kantotrezoro, kiu esprimas la spiriton de la esperantistoj, konsistas ankoraŭ el nur du, tri kantoj kreitaj en la komenco.

Kongresa Universitato de 38a Japana Kongreso.
Eld. Nagoja Esperanto-Societo,
Syowa-ku Kurumada-tyo 2-39, Nagoja, Japan.
Prezo US-dol. 0,25 + afr. — al revendantoj
pogrande 0,20 dol.

La broŝuro enhavas krom antaŭparolo de prof. Egami kvar prelegojn faritajn dum la japana esperantokongreso 1951. 1. Esperanto kaj internaciismo — de Prof. Takasugi. La preleginto estis longe militkaptito ĉe la rusoj, kaj lia impresado de ilia sinteno al internacia komuneco estas tre interesa kaj, ŝajnas al mi, ankaŭ objektiva. 2. Semo semita — biologia prelego de prof. Oota. 3. Nova ordo en homa mondo — de prof. (jura) Hasegawa. 4. Ĉu ekzistas edukado al la feto — de dro prof. Yagi. Ĉiuj prelegoj estas interesaj, kaj kiu ajn povas legi kaj kompreni ilin.

S. E.

Ole Klindt-Jensen: Paco kaj milito dum la ferepoko de Bornholm.
Prezo 1 d. kr. (2 rpk). Havebla ĉe EFDA, Laksegade 35, Kopenhago K., Danlando.

Mallonga, bone verkita disertaĵo pri la elfoso de ferepoka loĝoloko sur Bornholm. (Represaĵo el Scienca Revuo, Vol. 3, nro 4.)

Poul Thorsen: Bibliografio pri dana literaturo tradukita en Esperanto. 16 p. kun kartona kovrilo. Eld. de Dansk Esperanto-Blad. Prezo 1,50 dkr. Havebla de Libroservo de CDEL, Hörmarksalle 5, Risskov, Danlando.

Modela listigo de tradukoj el la dana en esperanton. La bibliografio ampleksas 355 titolojn, 94 aŭtorojn kaj 57 tradukintojn. 177 el la tradukoj estas poemoj.

Kompletaj jarkolektoj de Malgranda Revuo restas de 1948, 4 numeroj, prezo 4 kr — 1950, 6 nroj, 6 kr — 1951, 4 nroj, 6 kr 1952, 4 nroj, 6 kr.

El 1949 restas la nroj 1—3 (nro 4 elĉerpiĝis), po 1 kr.

El 1947 restas la nroj 3 kaj 4 (kaj kelkaj de nro 1), po 0,50 kr.

Krome restas multaj ekz. de nro 3/1946 kaj de la nroj 3 kaj 4 1944, po 0,50 kr.

Se iu deziras mendi, afable faru tion baldaŭ, ĉar mi konservas ilin ne longe. Al libroservoj kaj privataj revendantoj kutiman rabaton.

S. Engholm.